



Nia Kara Dipatrino je Mizero

*EN
ESPERANTO*

LA LEGENDO DE NIA KARA DIPATRINO JE MIZERO

En la dekkvara jarcento viro nomita Nelis, li estis tridekjara.

Nelis jam estis ekde sia juneco bovo-paŝtisto kaj por akiri iom da trinkmono li trikis ŝtrumpetojn por la kampulino de la biendomo "Siemen Runxputte".

Estis iu printempotago kiam li serĉis vanelovojn sur la kampo de kampulo Siemen, li tretis per sia ligna ŝuo sur akraflanka ŝtupo kiu kuŝis sub la sablo.

Li liberigis la objekton per siaj grandegaj manoj kaj prenis ĝin por forĵeti.

Kliniĝante, li vidis lignan skulptaĵon de Mario kun Jesuinfano.

Lia maljuna patrino purigis la skulptaĵon de sablo kaj polvo per sia naztuko kaj ŝi formetis ĝin en malnova valizo. La venontan tagon ŝi portus ĝin al la pastro.

Sed kiam la honesta Nelis en la mateno rapide kuris tra la kampo de kampulo Siemen al liaj bovinoj, li trovis apud

vanelnesto inkluzive tri ovojn, denove la lignan skulptaĵon.

En tiuj tagoj, riĉa komercisto el Alkmaar nomita Johannes Mors, kiu veturis per ŝipo plenplena de fero, sur la maro, konfirmis tia la strangan okazintaĵon, ĉar tiam li flosis dum multaj tagoj sen vento, tiel ke la malsatmorto minacis lin kaj liajn matrosojn. Tiam li songis pri la skulptaĵo de Runxputte, antaŭe li tute ne aŭdis pri tio. Virinvoĉo flustris:

"La vento blovos kiam vi adoras min!"

Post la songo, lia ŝipo veturis per suda vento. Post multaj serĉadoj li trovis vilaĝeton "Runxputte". Li kunportis plenmanojn da ordukatoj por konstrui ŝtonan kapelon. Jam en la jaro 1409 oni enoficigis rektoron.

Ekde tiu momento multe da homoj alfluis al la kapelo, en la espero trovi konsolon.

Por la ĉirkaŭloĝantoj kaj pilgrimantoj estis la jaro 1573 terura, kiam krudaj militistoj dum la sieĝo de Alkmaar faris senkonsolan ruinon el la kapelo.

Tamen la pilgrimantoj daŭre alfluis, malgraŭ la kontraŭlaboro de la potencaj magistratoj, kiuj eĉ la ruinaĵon transportigis per ĉarumo kaj disŝutigis sur la kampoj.

En la jaro 1930 estis konstruita nova kapelo, pli bela ol la antaŭa kapelo.

Kiu tie en silento surgenuas, gustumas ĉiam la gracon de Mario kaj abundan benon, tiu aŭdas ĉiam Ŝian voĉon:

*“La vento –la beno de mia kara Filo–
blovos, kiam vi adoras Min!”*

LA GRACKAPELO KAJ LA SKULPTAĴO DE NIA KARA DIPATRINO JE MIZERO

Sur la fundo de la mezepoka kapelo kiu ruiniĝis en la jaro 1575, estis konstruita la hodiaŭa grackapelo en la jaro 1930 (Jan Stuyt), unu el la unuaj estraranoj de la Fondaĵo.

La unua Virino de “Kennemerland” tronas en la kavalira saloneto. De kie ŝi ricevas Ŝiajn homojn kun grandaj kaj malgrandaj mizeroj.

La antaŭkorto ĉirkaŭiĝas per simpla arkadaro kun ligna tegmento.

Dum la ruinigado de la sanktejo perdiĝis la origina figuro de nia plej kara Dipatrino je Mizero.

La nuntempan figuron konstruigis Mengelberg laŭ malnova memoriga medalo, trovita en la episkopa muzeo en Haarlem. En la soklo de tiu ĉi figuro estas enmasonita rokparteto de Lourdes.

Han Bijvoet surpentris abunde la kapelon per freskoj, kiuj figuras la lokon de Mario en la benhistorio de nia liberigo. Kartoj de la apartaj freskoj estas haveblaj en la librejo malantaŭe en la kapelo.

LA FONTO

Meza en la antaŭkorto situas la malnova Runxputo, kiu estis Mariofonto. En la nokto inter la 8-a kaj la 9-a de decembro en la jaro 1713 subite el la plensŭtita fonto fluis abunde akvo.

En la historio de la sanktejo staras centre ĉi tiu fonto. Ĝenerale oni supozas ke la origina nomo estis prenita de postrestinta normano, nomita Rorik.

Al la akvo eblus atribui sanigan forton. Malproksime en la Vilibrorda aleo situas la rokfontano, pli freŝdata, kun la intenco havigi meditan anguleton, pri la Vivanta Akvo kiun montras la fonto kaj la grackapelo. La Vilibrorda aleo finiĝas per

la figuro de Sankta Vilibrordo, kiu gardas la sanktejon de Mario.

Jam en la antikva tempo ekzistis ligilo inter Nia Kara Dipatrino je Mizero kaj Sankta Vilibrordo.

Tiu ĉi ligilo eble paroligas nur al nia imago.

KELKAJ DATOJ EL LA HISTORIO DE NIA KARA DIPATRINO JE MIZERO

1409 La kanonikaro en Utrecht enoficigas rektoron pri la kapelo.

1573 Dum la sieĝo de Alkmaar la krudaj militistoj ruinigas la kapelon.

1637 La Deputitaro de Holando ordonas ke la ruino de la kapelo estu mal-konstruita.

1656 En la maparo de Marianus nia kara Dipatrino je Mizero estas nomita nia kara Dipatrino de “Runxputte”.

Oni skribas ke tie estas mirakla skulptaĵo kaj la katolikaj homoj persistas en adorado.

1713 En tiu ĉi jaro estas pesteksplodo ĉe la brutaro. Pilgrimantoj alfluas al la kapelo.

En la nokto inter la 8-a kaj la 9-a de decembro fluas el la plensutita fonto subite abunde akvo.

1905 Je la 20a de marto estas retrovita la “Runxputte” kaj post kelkaj tagoj oni retrovas la fundamentojn de la detruita kapelo.

1913 En kelkaj monatoj oni konstruas novan grandan provizoran kapelon por la daŭro de 50 jaroj, sed ĝis nun la kapelo staras ankoraŭ sur tiu loko.

1930 Episkopa moŝto Aengenent konsekras la grackapelon, konstruitan de arkitekto Jan Stuyt.

1994 Je la 9-a de septembro estas la oficiala malfermo de la renkontiĝa centro nomita “Oesdom”. (prononcu “Usdom”)